



# Eksigo de du Anoj de la Esperantida Akademio.

Idisto aliĝas al Esperanto.

Esperantisto, deveninta Esperantido, revenas al ni.

En la lasta numero de la gazeto de d-ro Saussure ni legas jenan scigon:

S-ro Weferling, idista membro de nia Akademio, deziras eksigi, ĉar li opinias, ke la grandaj progresoj de Esperanto justigas la apogon de ĉiuj samideanoj kaj la ĉesigon de la skismoj, almenaŭ ĝis la oficiala akcepto de Esperanto.

En la nov-decembra numero de „La Esperantisto“ s-ro Dabrowski, membro de la Esperantida Akademio, publikigas sekvantan „Publikan Deklaron“:

Mi subskribinto konfesas, ke mi de oktobro 1919 estis membro de la „Esperantida Akademio“. Mi apartenis al ĝi en la konvinko, ke sur la bazo de „Esperantido“ estos ebla la unuiĝo de Esperanto kaj Idoj. Eĉ en julio mi skribis al la „Esperantida Akademio“, ke mi intencas fondi „Esperantidan Oficejon“ en mia urbo. Tamen la lastaj sukcesoj de Esperanto, precipe la sukceso ĉe la Kongreso de Internaciaj Asocioj en Bruselo, pruvis al mi evidente, ke la idista danĝero estas troaktata, kaj ke la Esperantismo por venki bezonas nepre *lingvan stabilecon kaj unuecon en sia propra tendaro*. Veninte al tiu konkludo, mi deklaras mian eksigon el la „Esperantida Akademio“, ĉesas esti delegito Esp-ida kaj gvidi Esp-idan Oficejon. *Mi propagandos denove nur Esperanton*. Sinjorino de Saussure mi petas sur tiu ĉi vojo, publikigi en sia organo pri mia propravola eksigo, kaj mi esprimas la deziron, ke li ne plu uzu mian nomon por siaj lingvaj projektoj.

Roman Dabrowski

estinta membro de l' „Esperantida Akademio“.

Jen imitinda ekzemplo de du samideanoj, kiuj metas la ideon super la formon. *Unuecon* ni bezonas nuntempe en la mondiĝiva movado, niajn dezirojn je reformoj kaj plibonigoj ni devas praksi ĝis la tempo, kiam la ideo mem de lingvo internacia estos veninta en la mondo. Oni povas tute malŝati la nunan formon de la lingvo internacia, t. e. Esperanto; kaj tamen esti bonega esperantisto. Tio estas konscienco! Ke la aliaj reformuloj tion komprenu kaj imitu la ekzemplon de s-anoj Weferling kaj Dabrowski! La „muroj de miljaroj“ jam baldaŭege ekŝanceliĝas kaj difalu. Por ni ĉiam fidele esperantistoj la transiro de la esperantidoj al nia tendaro estas nova pruvo, ke ni solaj estas sur la ĝusta vojo, ĝi estas por ni nova kuraĝigo kaj nova instigo al ĉiam pli fervora agado, spite la skismajn sistemojn, kiuj atingis ĝis nun eĉ nenian praktikan sukceson. Ni persistu, kaj jam la celo fariĝos proksima!

## Komerco.

Granda trookupo ĉe la Frankfurta Foiro.

Oni skribas al ni: Por partopreni la printempan foiron de Frankfurt, kiu okazos la 10.—16. aprilo, anoncis sin ĝis 31. dec., la lasta termino por anoncoj el la enlando, en ĉiuj branĉoj fion da ekspoziciantoj, ke la ekspoziciaj haloj ne sufiĉas malgraŭ denove konsiderindaj pligrandigoj. Ĉe

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Sidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (11-a daŭrigo.)

La vagonaro ankoraŭ ne alvenis. La perono estis lokita samnivele kun la tria dometaĝo. Mal-supre marŝadis homoj, preterveturis grandegaj ŝarĝveturiloj, tintante preterglitis tramoj; supre, en la blua ĉielo, naĝis nubetoj, blankaj, helaj, similaj al tiuj en Ruslando. „Jen!“ pensis Mateo, „flugus tiu nubeto super la tero, super la oceano, venos en Loziŝĉ'on, enrigardos en la klaran akvon de nia rivereto, vidos niajn hejmajn domojn, nian kamparon, homojn, veturantajn laŭ Dia ordono en bonaj duĉevalaj ĉaroj. Ĉu tie en Loziŝĉ oni povus imagi, ke ni du Loziŝĉanoj staras nun en fremda urbeĝo, ke oni nin mokas, kvazaŭ ni ne estus kristanoj, kvazaŭ ni ĉi tien alvenus por esti primokataj... Ke ni staras nek sur tero, nek sur monto, ke ni estas flugontaj sur aero en la maŝino.“

„Mia Dio, mia Dio!“ samtempe pensis Anna. „Sed se ĝi irafalos! Se ni kune kun tiu maŝino falos malsupren, sur la ŝtonan pavimon! Jesuo Kristo, Mario Virgulino, sankta Jozefo! Ĉiu animo laŭdu Dion!“

Dima staris atendante kaj mordis sian longan lipharon.

Sur la reloj malproksime aperis la cirklo, ruliĝis ĉiam kreskante, ĉiam alproksimiĝante, — la fero ekgrincis, ekparolis sub iliaj piedoj, momenton poste la tuta vagonaro kuris preter la perono. Ĝi ekfajfis, haltis, la pordoj malfermiĝis, kelkaj dekoj da homoj preterrapidis antaŭ niaj Loziŝĉanoj, kiuj nun ankaŭ envagoniĝis, okupis la vakantajn lokojn, post kio la vagonaro ekflugis tiel rapide, ke fenestroj en la domoj jen aperis, jen malaperis...

kelkaj branĉoj, ekzemple ĉe la tekso, leda kaj tabaka branĉoj, oni bezonas pli ol la duoblan lokon. Cetere la trookupo je la finintermo estis inter 50 kaj 85 procentoj. Intertempe alvenis ĉiutage kelkcentoj da novaj anoncoj. Ĉe tiu okazo estas eble interese legi jenon: La lasta aŭtuna foiro de Leipzig alkondukis al ĉiu ekspozicianto 6,6 aĉetantojn (laŭ la oficiala foir-organo de 11. sept.), dum la lasta aŭtuna foiro de Frankfurt alkondukis al ĉiu ekspozicianto meznombro 26,6 aĉetantojn.

## Gazetaro.

REGGELI HIRLAP, Miskolc (Hung). Politika ĉiutaga ĵurnalo. La numero de 5. jan. enhavas diversajn artikolojn ricevitajn per Esperanto (interalie Leteron el Polio, laŭ IES).

## Societa Vivo.

BUDAPEST. Post la bonega sukcesinta Zamenhof-Vespero, ĉe kiu ĉeestis 100 pers., oni aranĝis Silvestro-festeton la lastan tagon de la jaro 1920. Tia varma, agrabla, familia vespero ankoraŭ ne estis en Budapeŝt depon la milito. Per ludado, deklamado, paroladoj, eĉ dancado rapide forpasis la horoj. S-ano Laquer alvokis la s-anojn labori en la nova jaro per nova forto. S-ano Balkanyi laŭlegis saluton de s-ano Pitlik el Praha. Plej brilaj programpunktoj estis la prezentadoj de la militkapiteco siberia reveninta samideanoj Julio Baghy, kiu deklamis bonegan poemojn proprajn, kaj Mihaelo Sarosi, kiu kantis poemojn de Baghy ĉe gitar-akompano per propre farita ĉarma muziko.

ĈERVENY-KOSTELEK (Ĉeĥoslovakio). Tria laborokunsido de orient-bohemaj esperantistoj okazis la 12. dec. 1920 en Červený-Kostelec. Partoprenis 80 personoj el 15 lokoj: Hradec Kralové, Pardubice, Moravany, Prelouc, Jablonné n/orl., Usti n/orl., Brandys n/orl., Dobruska, Dvur Kral., Ĉeska, Skalce, Starkoc, Mezilesi, Kopydlno, Bernsdorf, Červený Kostelec. Venonta kunveno okazos en Usti n/orl. la 6. aŭ 15. febr.

GRAZ (Stirio). Sendube estas en tuta Aŭstrujo en Stirio la plej bona Esperanta movado. La Esp. Societo por Stirio laboras tre vigle kaj jam estas tre konata inter la popolo, precipe pro la „infana“ agado. Preskaŭ ĉiam estas aranĝataj kursoj por infanoj, kiuj poste venas Hispanujon por tie refreŝigi kaj renovigi siajn fortojn. Ankaŭ la katolika Esp. movado en tiu ĉi lando tre bone progresas. La 5. nov. estas fondita katolika Esperanto Societo „Por alta celo“, kiu jam nombras 50 anojn kaj laboras precipe inter la Stiria katolikaro. Prez. estas s-ro Hanns Sappl, Sekretario de lka kaj Moka, kiu donos ĉiujn postultajn informojn. La kat. grupo ankaŭ intencas aranĝi ekspozicion kaj petas tial sendi al la grupo Esp. gazeton ktp. Adreso: Graz, Stirio, Karmeliterpl. 5.

KISPEST (Hung.). S-ano Zsamobky finis kurson kun dekdu lernantoj, nova komenciĝis. KOLONJO (Köln, Germ.). La Esp. Societo de 1906 havis sian jarkunvenon la 12. jan. La societo nun nombras 40 membrojn. La Esp. vivo en la rejnlanda metropolo lastan jaron tre vigliĝis. Nuntempe funkcias kursoj inter laboristoj (s-ro Hurler en Köln kaj Knappsack, s-ro Brakel en Köln-Kalk kaj Köln-Mülheim), katolikaj vendistoj

Mateo fermis la okulojn, Anna sin signadis krucе, murmurante preĝojn. Dima rigardis ĉirkaŭen kun provokanta mieno. Li atendis, ke la amerikanoj, sidantaj en la vagono, ankaŭ rigardaĉos iliajn ĉapojn kaj kielojn, elde ankaŭ jetados kontraŭ lin bananrestojn. Sed certe tiuj amerikanoj estis homoj seriozaj, neniu eĉ atentis ilin, neniu ridetis. Ĉi tiu plaĉis al Dima, kaj li iomete trankviliĝis.

Baldaŭ la vagonaro haltis, kaj ili ĉiuj tute feliĉe malsuprenvenis per la ŝtuparo sur la straton...

VII.

La gastejo de Mr. Bork tute ne similis la niajn. La niaj, t. e. gastejoj de Volin'ja gubernio, de apud Mogilevo, generale en Poljesje, estas multe pli bonaj: longa unuetaĝa domo kun blanke smiritaj muroj; en la korton kondukas larĝa pordego, aspektanta tiel agraba, tiel agraba, ke ĉevaloj memvole eniras. Trans la pordego — larĝa korto kun alta paila tegmento, sub kiu flugas aro da paseroj, sub kiu kolomboj kvervas tiel dolĉe — kie, ne estas videbla! En la korto — puto kun kapstano, manĝujo por ĉevaloj; — kokinoj, kaprino, bovino, odoro de ĉevala ŝvito, de gudro, de freŝa fojno... Ĝis sia morto oni kun plezuro pensas pri ĉio ĉi tio!

Mateo kaj Dima en sia hejma vilaĝo estis ŝataj kiel homoj respektindaj, homoj, kiuj konas decajn manierojn. Vizitante foiregon aŭ feston, ili ofte havis la okazon hali en plenplena gastejo aŭ urbata drinkejo, sed ili neniam sentis sin ĝenataj.

Konata afero, — ĉiu homo scias, kiel li devas konduti en tiu alia loko. Oni elektas konvenan lokon por sia ĉevalo, jetas al ĝi fojnon aŭ alligas buŝsaketon kun aveno; poste oni metas sian vipon post la zonan, por ke ĉiu vidu, ke oni tute ne estas ia vagulo aŭ almozulo, mezuranta la mondon per siaj du piedoj, sed vera mastro, posedanta propran bruton, propran veturilon; poste oni eniras en la domon kaj atendas, ĝis liberiĝos loko ĉe tablo.

(s-ro Wilbert en Köln-Mülheim) kaj inter konduktoroj de urba elektra fervojo (s-ro Derflinger). Krome kelkaj privataj kursoj de s-roj Buchel, Junker k. a. Loka grupo en Köln-Kalk restariĝis. Fondiĝis Esp. sekcio ĉe Frey-Ligo. Baldaŭ oni komencos propagandon inter gimnaziaj instruistoj kaj inter katolikaj pastroj. Kelkfoje artikoloj en „Rhein. Volkswacht“ (katolika) kaj „Rhein. Zeitung“ (socialista).

## Nekrologio.

S-ro Walter Piŝt el Bath (Angl.) bone konata inĝeniero, prezidanto de la Bath'a Esp. Societo kaj dumviva membro de UEA, mortis la 10. jan. je la aĝo de 68 jaroj.

## Internacio Katolika.

Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj.

Jarkunveno. La 12. dec. 1920 en Breslau, Vinzenz-Domo.

Tagordo: 1. Jarraporto, 2. kasa raporto, senŝarĝigo, 3. proponoj, 4. diversaj aferoj.

Esceptite la 1-a sekretario, kiu ekŝiĝis kaj estis anstataŭata, la estraro restis laŭtate en la ofico. Ĝi konsistas el prez. instruisto M. Mieler, Breslau, Werderstrasse 55; 1-a sekr. f-ino M. Dittich, Breslau, Herdainsstrasse 52; 1-a sekr. instruisto H. Baumgart, Breslau, Försterstr. 12; 1-a kasisto komercisto Berger, Breslau, Kohlenstr. 6; 1-a kas. s-ino Berger; konsilantoj prepozito Becker (nuntempe en Bromberg) kaj registara sekr. Stabler, Schweidnitz.

Al la cetera konsilantaro nuntempe apartenas jenaj prezidantoj de lokaj grupoj: studkonsilanto Kropf en Beuthen O/S. (Frateco), Dr. Bremm en Bonn, gimn. instr. Mieler en Breslau (Unueco), H. Steinich en Düsseldorf, advokato Dr. Hinsen-kamp en Essen, regist. konstruisto Mengele en Führi, urba kaplano Dr. Hoßelt en Nürnberg kaj ĉefkaplano Lukas en München (Saluton Maria).

La jarkunveno decidis:

1. GLKE aliĝas al la Internacio Katolika (lka) kiel orda membro kun jara kotizo de 20 pf. po membro. La lga kaso nur pagas la kotizon por la opaj membroj. La lokaj grupoj kolektas la kotizon por siaj membroj aparte kaj sendas ĝin komence de la jaro, sen pluaj kostoj por la lga kaso, al la lig-kasisto (poŝtekonto): Kaufm. Berger, Zahlstelle des Bundes kath. Esp. Deutschlands, Breslau Nr. 305 85.

2. GLKE instigas la landdirektoron de la lka por Germanujo, Rev. urban kaplanon d-ron Hoßelt en Nürnberg, ke li

a) startigu landkomitaton de la lka por Germanujo, en kiu enestis la organizaĵoj aliĝintaj al lka kiel ordaj membroj po du, la organizaĵoj aliĝintaj kiel eksterordaj membroj po unu delegitoj;

b) elektu delegitojn de la lka en ĉiu germana teritorio;

c) zorgu, ke formiĝas ĉefkomitato de la tiel elektitaj delegitoj.

3. GLKE aliĝas korporacie al la Germana Esp. Asocio, tiamaniere, ke (laŭ interkonsento kun la estraro de GEA, sed rezervite je la aprobo de la konsilantaro kaj de la venonta jarkunveno de GEA):

a) devige aliĝos la opaj lokaj grupoj de GLKE kun jara kotizo de 1 mk. po ĉiu orda grupo-membro;

Dume oni ĉirkaŭrigardas kaj tuj vidas, kiajn homojn Dio ĉi tien sendis, tiel ke senprokraste oni kapablas komenci konvenan interparolon: malsamaj temoj taŭgas por interparolo kun simpla vilaĝano, aŭ kun sia egalulo aŭ kun burĝo, kun sinjoro nobelo aŭ kun biena-administranto. Kompreneble, oni bone konas sian lokon<sup>1)</sup>; se ĉe tablo sidas pretervojaĝanta sinjoro, certe oni devas atendi, kvankam la loko sufiĉas.

Unuvorte — oni ĉiam iradis en la mondo kun malfermitaj okuloj, oni konis sin mem, oni konis la homojn, tial oni akceptis gastamecon kaj respekton de siaj egaluloj, la fierulojn oni evitis kaj, se iafoje oni havis malagrablaĵojn pro tuj moŝtaj sinjoroj, tio tamen ne ofte okazis...

Sed nun ili per unu fojo fariĝis kvazaŭ blinduloj. Ne piedire ili alvenis ĉi tien, kiel iam dum pilgrimvojaĝoj, kaj ne per ĉevaloj, sed fluge sur aero. Ankaŭ la gastejo de Mr. Bork tute ne similis gastejon. Ĝi estis tute simple granda domo, iom malluma kaj nealoga.

Bork malŝlosis la pordon per sia sloilo, kaj ĉiuj supreniris ŝtuparon. Tie ili vidis mallongan koridoron kun kelkaj pordoj. Invititaj de Bork, ili eniris tra unu el ili, haltis ĉe la sojlo, metis sian pakajon sur la plankon, demetis la ĉapojn kaj ĉirkaŭrigardis.

La ĉambro estis vasta. En ĝi troviĝis kelke da litoj, tre larĝaj, kun blankaj kusenoj. Ĉe unu el la litoj staris malgranda tablo kaj, krom tiu, troviĝis nur kelkaj seĝoj en la ĉambro. Sur unu muro pendis granda pentraĵo, sur kiu la statuo de „Libereco“ suprenlevadis sian torĉon, kaj apude litografajo, prezentanta kvinkandeligon kaj hebrean kestion de atesto. Similajn fotografajojn Mateo iam vidis hejme en Volin', kaj certe Bork kunportis ĝi tiam en Amerikon.

<sup>1)</sup> Rusa esprimo: konvenajoj.



b) povas aligi laŭvole la opaj membroj kun jara kotizo de 15 mk.

Lokaj grupoj kaj opaj membroj havas la samajn rajtojn kiel la aliaj membroj de GEA laŭ la statuto (voĉdonado ktp.). GEA liveras al la lokaj grupoj kaj al la opaj membroj po unu ekzemplero de „Germana Esperantisto“.

4. Kotizoj por 1921.

a) Lokaj grupoj pagas duonjare anticipe la 1. jan. kaj 1. julio laŭ la alterna nombro de la membroj sen pliaj kostoj al la supre nomita poŝt-ĉekkonto por ĉiu orda grupano 1 mk. Ili havas pretendon je libera alsendo de 1-2 ekzempleroj de la ligkomunikajoj.

b) Opaj membroj pagas por la kalendara jaro en januaro aŭ okaze de la aligo 10 mk. sen pliaj kostoj al la konata poŝtĉekkonto. Ili ankaŭ kiel la honoraj membroj kaj favorantoj (la lastaj, se ili pagas minimume 10 mk. po jaro) ricevas senpage la ligkomunikajojn.

5. Ligorgano. Ligorgano de nun estas la oficiala organo de lka, kies abono por ĉiuj opaj membroj estas deviga kaj al ĉiuj grupanoj estas urĝe rekomendata. (Ligorgano de la lka estas nuntempe la internacia monata gazeto „Espero Katolika“, ricevebla ĉe s-ro Joh. Schröder, Wien VIII, Kaiserstr. 10; abonprezo por 1921: 12 mk.) La ligkomunikajoj estas eldonataj laŭbezono de la listestro en laŭpraktika maniero.

La oficiala organo de lka kaj aliaj Esp. gazetoj ankaŭ enhavas ligkomunikajojn.

6. Kongreso. La unua kongreso de GLKE okazos 1921 kune kun la proksima kongreso de GEA, la debatoj pri loko kaj tempo ankoraŭ ne finis. Detaloj ankoraŭ sekvos.

Fine estu atentigata pri:

1. la nepre neceseco, aldoni resendkoston en la korespondado kun la tuta listestro (tio koncernas ne nur la opajn membrojn, sed ankaŭ la lokajn grupojn);

2. la bonega nova ligvarbilo, la broŝuro „Die kath. Internationale“, verkita de la ĝenerala direktoro de lka d-ro M. J. Meppger. Oni mendu bonvole senpere ĉe Paulusverlag, Graz (Stirio), Karmeliterplatz 5 (prezo ĉ. 1.50-2.00 kr.

3. la ankoraŭ ĉiam granda provizoro de ligflugfolioj (100 ekz. 3 mk., 500 12 mk., 1000 20 mk., ekskluzive sendkoston) kaj la ligsigelmarkoj (1 kiero kun 40 markoj kostas 2 mk.). Mendante ilin, oni laŭdezire subtenas la ligan kason.

Al ĉiuj liganoj gracoriĉan, sanan, feliĉan novjaron! Antaŭen kun Dio por plua celkonscia agado!

Kun fidele-katolika ligŝaluto

Magda Dittrich, 1-a sekr.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun eldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

### La hungara Terbienreformo.)

Oni ankoraŭ ĉiam distingas eksterlande la sciiĝojn, ke en Hungario furiozas la plej malluma reakcio. Dume la nacia kunveno elektita per tre vastronda, ĝenerala, sekreta, ankaŭ al virinoj etendiĝinta balotrajto, akceptis demokratian leĝon pri bienreformo.)

Kontraŭ 66% libertrafikaj bienoj estis 54% ligitaj bienoj, 32,29% estis la grandbienoj. Tiamaniere tre multiĝis la nombro de kamparan-proletarioj.

Jam la Karolyi-registaro volis en 1918 solvi tiun ĉi problemon, sed tio estis, kiel ilia tuta revolucio, tro utopia, ĉar oni estus devinta disdoni pli da tero, ol en Hungarlando ekzistas.

La nun akceptita leĝo eliras el tiuj du fundamentaj principoj egaligante unu la alian, ke unu parte oni devas gardi la sendifekcion de la nacia mastrumado, aliparte oni devas ebligis inter tiuj ĉi limoj, ke kiel eble plej multaj per mastrumado vivantaj personoj povu trovi okupadon. Por prizorgi la grandurbojn kaj por la ebleco de eksporto kaj pli efika produktado, ĝi volas subteni malgrandan parton de la grandaj bienoj; sed la unuan gravecon ricevas la plej grandampleksa konstruado de la malgrandbienmastru-socio, ĉar la leĝo intencas, ke la spino de la hungara nacia vivo estu unu potencia malgrandbienmastru-socio. Fine per kreo de malgrandegaj bienoj kulturotaj intense, ĝi celas ligi al la nacio per amo de la tero la terkulturan proletarianon.

La gvidanta penso de la bienreformo estas, ke ekzistu kiel eble plej multaj malgrandfunkciaj mastrumadunecoj, ĉar kiel la ekzemploj de Danujo kaj Svisujo montras, nur tiamaniere instalitaj ŝtatoj estas sekuraj je ekonomiaj revolucioj.

Por atingi siajn celojn, la bienreformo ne entenas rigidajn aranĝojn, kiel ekzemple ĝi ne pridicidas bienmaksimumon aŭ minimumon, sed nur tial ĝeneralajn fundamentajn principojn, kiuj ebligas en ĉiuj partoj de la lando la priatenton de la specialaj kaj ofte tre diversaj rilatoj. La sukceso de la reformo dependas do de ĝia plenumado, la leĝo per granda ĉirkaŭrigardo fiksas la antaŭkondiĉojn de la justa plenumo. Tial por efektiviĝi la terbienreformon la leĝo kreas apartan organon egalrangan al la plej superaj juĝistaroj de la lando, la terbienaranĝantan juĝistaron, por kiu ĝi certigas plenan sendependecon de ĉiutempaj juĝistaroj. La membroj de tiu ĉi juĝistaro estas la membroj de la plej superaj juĝistaroj de l' reprezentantoj de la terkulturaj ĉambroj kaj de la altrujstaj mon-institutoj. Per plena flankenigo

de la taga politiko tiu ĉi organo estas do legio de fakuloj, en kiu kunsidas la plej eminentaj reprezentantoj de la justecfarado, de la terkulturada kaj per ĉi tiu kunligita financa mondo.

La necesan teron por efektiviĝi la reformon la leĝo certigas per radikaj decidoj: la ŝtato ricevas la unuan aĉetrajton de ĉiuj vendebaj bienoj. Se per tio oni ne povus en la regiono kontentigi la ter neceson, la ŝtato havas la rajton de proprigo. Ĉe ties reguligo la ĉefa principo estas, ke per proprigo la produktado de la bieno pligrandiĝu. La aĉeto kaj proprigo okazas per la pago de la plena trafikala valoro; la objekto estas pritraktota ĉe libera kompromiso, ĉe neebla interkompreniĝo decidita la landa terbienaranĝanta juĝistaro.

La bienreformo ne malhelpas la vendadon al privatpersonoj sed ĝi metas ĉi tiun sub ŝtatan kontrolon por gardi la interesojn de la aĉetantoj.

Ĉe akiro de bieno la leĝo bazas precipe sur la posedrajta akiro; sed pripensante la hodiaŭn malfacilan ekonomian situacion, ĉe kiu verŝajne granda parto de la aĉetantoj eĉ per pruntopreno ne povas havigi la aĉetprezon kaj elspezojn de instaligo, la leĝo enkondukis la renbienojn, tiamaniere, ke la mastrumanto de renbieno povos poste, akirinte pli bonan ekonomian situacion, proprigi la renbieno.

Fine la leĝo fiksas familian hejmdifendon por la bienoj akiritaj laŭ siaj decidoj, tio estas, ĝi realigas detalan „homstead“-aranĝojn kaj fiksas la regulojn de heredo.

El tiu ĉi mallonga priskribo oni povas vidi, ke la hungara terposeda reformo estas ekmovanto, de el ĉiuj partoj demokratike kaj fundamente efika transformiĝo, kiu same radikale aliigos la strukturon socian kaj ekonomian de Hungarujo, kiel la politikan aliigos la leĝoj de 1848. Tiam la reganta partio abdikis de siaj antaŭrajtoj, nun ĝi transdonas sian ekonomian superecon al la malsupraj popolklasoj. La pritraktado kaj akcepto de tiu ĉi reformo okazis en la nacia kunveno per preskaŭ unuanima entuziasmo, kaj nun estas la vico de ĝia justa plenumo, pri kies demokrata realigo oni ne povas dubi, ĉar ĝia plenumado estas gvidata per Stefano Szabo de Nagyatad, la plej firma demokratio individuo de la nova hungara politika vivo, kiu estas mem malgrandbienmastru, kaj kiel gvidanto de la malgrandbienmastru socio venis en la nacian kunvenon kaj en la seĝon de la terkultura ministro.

1) Certe ĉiujn landojn interesas la terposed-reforma problemoj nun ĉe aktualaj kaj ĝia solvo per la nova leĝo en Hungarujo! Ĉi tiu artikolo ricevis la H. E. Servo de la Hungara Reĝa Ministerio por Eksteraj Aferoj por provi, kiom da aliindaj ĵurnaloj ĝin represos per Esperanto! Helpu do ĉiuj! Kiu ensendos aperintan tradukon en nacia gazeto al H. E. Servo. (Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt VI, Hajos utca 15-1/2) ricevos libere kaj hungara Esp. literaturon.

2) La permeso de Esperanto-instruado pravas ankaŭ la kontrajto!

## Adresoj en Nederlando.

### Societoj:

Nederlanda Esp. Societo: J. van de Velde, Rodenrijse straat 25b, Rotterdam.

Nederlanda Federacio de Laboristoj Esperantistaj:

A. Kloek, 1-e Sweelinkstraat 19-II, Amsterdam. Nederlanda R.-Katolika Esp. Ligo: H. B. van Zwet, Laren (N. H.).

### Redaktoroj:

Nederland-Esperanto: A. Kloek, 1-e Sweelinkstraat 19-II, Amsterdam.

La Holanda Pioniro: H. C. Mees, Sundastraat 21, Hago.

Internacia Socia Revuo: W. Nutters, van Ostadestraat 94-III, Amsterdam.

## Parolejo.

45.

### LA TITOLO DE NIA ĴURNALO.

Pri la titolo ne nia ĵurnalo ni ricevis ok pluinajn opiniojn. El ili kvar deziras restigi la nunan titolon, la aliaj proponas Internacia Semajno, La Semajno, Esperanta Semajno, La Ĵurnalo, Revuo (kun malgranda subtitolo) Esperanto Triumfonta. La novaj plendantoj por konservado de la nunta titolo estas: s-anoj O. Rieck, Greifswald; K. Vidikauskas, Philadelphia; Georg Steiner, Győr kaj d-ro Kelocsy, Budapeŝt. La dezirantoj de alia titolo estas Ch. G. Stuart-Menteth, London; F. Cesarini, Potenza; E. Klemm, Chemnitz kaj J. Esser, Düsseldorf. Kiam ni havos pli da loko, ni pritraktos la temon iom pli detale.

46.

### PRI „LINGVAJ RESPONDOJ“

kaj ion pri la Esperanta Literaturo.

Oni krias nun en preskaŭ ĉiuj Esp. gazetoj: La unucentoj nun devas ne disigi siajn fortojn, ĉar nur unucento kondukas al la fina venko!

Tio certe rilatas ankaŭ al nia Esp. literaturo, la libro-kaj gazet-eldonado. Kunigi kaj disigi la ĵurnaltajn fortojn, ne konkuri reciproke, sed agi en konsento — tio devas esti nia devizo, kaj el tio rezultas: Nepe ne eldoni tiujn leĝojn, se ĝi ankoraŭ ne estas elĉerpita!

En unu el la lastaj numeroj de „Esperanto“ la ELA komunikis, ke „Lingvaj Respondoj“ estas elĉerpitaj... kiu elkonigis reeldonon? Ĉar nia eldonejo emis reeldonon la verkon, ni turnis nin al la Esp. Centra Librojo en Paris kaj ricevis jenan respondon:

Paris, la 5. 11. 20.

... Ni havas la honoron sciigi al vi:

1. Ke per speciala Kontrakti subskribita inter a) la Librojo Hachette, b) preskaŭ ĉiuj aŭtoroj aŭ iliaj heredintoj de la Esp. libroj apartenantaj al tiu firmo, c) nia Societo — ni farigis la eldonistoj-propruloj de preskaŭ ĉiuj libroj eldonitaj antaŭ de tiu Librojo, inter kiuj la Verko de D-ro Zamenhof.

2. Ke „Lingvaj Respondoj“ de D-ro Zamenhof ne estas elĉerpita. Ni ĉiam vendas ĝin kaj vendados...

En unu el la lastaj numeroj de ET ni legas surprizite, ke „s-ro W. Lippmann prilaboris kaj baldaŭ publikigos la Lingvaj Respondoj de d-ro Zamenhof (ĉe Germana Esp. Librojo, Leipzig)“. Ĉu eble la Lingvaj Respondoj efektive nun elĉerpigis, kaj ĉu la Esp. Centra Librojo komisiis s-ro Lippmann reeldoni ĉi tiun verkon? Aŭ ĉu s-ro Lippmann eraras opiniante, ke la verko estas elĉerpita? Ĉu ne estas pli bone antaŭe precize informi sin, ĉu la verko estas elĉerpita kaj la preso libera ktp.? Tiamaniere ni evitus tiajn aferojn. Estas domaĝe pro la laboro kaj la malprofito, kiujn havas la unu aŭ alia el la eldonejoj.

Tiam certe estus pli rekomendinde eldoni anstataŭ la ankoraŭ ne elĉerpita verko alian belan novan libron kaj pliriĝigi tiamaniere la Esp. literaturon. Ĉar bedaŭrinde ni movado ankoraŭ ne fion progresis, ke oni povas eldoni samtempe en diversaj lokoj la samajn librojn.

Nun estas novaj libroj tre bezonataj. Sed ili ne devas esti por duono de la tuta esperantisto ne aĉetebaj pro la teruraj prezoj! Ni dubas ĉu ekzemple iu el Germanio aĉetos la „Sono de Someromez Norko“ malgraŭ ĝia alta literatura valoro, se li devos pagi por tiu vere ne tro ampleksa libro karte bindita almenau 25 markojn (2 s. 3 p.). Aŭ ĉu la samideanoj en Polio povos pagi ĉirkaŭ 175 mk.? Kaj kion legu ĉi tiuj bedaŭrinduloj?

Sed kio rezultas el ĉio?

1. Ke la libro eble ne trovos sufiĉe da aĉetantoj kaj pro tio ankoraŭ pli karigoj, 2. ke duono de la esperantisto nur ĉiam ion „aŭdos“ pri tiuj novaj libroj, sed mem ne povos aĉeti ilin.

Estas ja efektive laŭinde, ke precipe la anglaj samideanoj tiom klopodis en la lasta tempo, por pliriĝigi la Esp. literaturon. Sed ĉu eble ne estus pli rekomendinde eldoni la librojn en landoj kun pli malaltaj valutoj? Ni proponus Germanion, Aŭstrion. Ĉu oni jam faris tian provon?

Kvankam ni estas nur de post unu jaro esperantistoj kaj eble ne havas tiel grandan sperton, tamen ŝajnas al ni, ke la esperantistaro estas tre legema — sed ne ricega! Ĉu ni estas malpravaj?

Volonte ni aŭdos voĉojn de aliaj samideanoj.

(Fratoj Fethke, Oppeln, Supra Silezio.)

47.

### PRI „MITINGO“.

(Respondo al s-ro H. Sakarias; komparu la Leteron el Estonio en ET n-ro 14.)

Rilate vian demandon pri la vorto „mitingo“ — mi kredas, ke ĝi estas tute neakceptinda. La angla vorto „meeting“ signifas pure kaj simple „kunveno“, kaj ne rilatas pli al sporta aŭ politika aŭ religia kunveno ol al aliespa kunveno. Mi ne kredas, ke anglo facile kutimigis ĝin limigi al unu speciala formo de kunveno, kaj mi vidas en la radiklo nenian superecon super „kunveno“, kaj nenian utilon. (Montagu C. Butler, sekretario de B. E. A.)

48.

### NACIA ELEKTO PRI PREZO

#### DE LA INTERNACIA POŝTO.

Se mi bone komprenas „The Times“ (kaj aliaj leĝoj-ojn), p. 11 kaj p. 14 por hieraŭ (11. 1. 21), la decidoj de la Poŝta Kongreso ĉe Madrid permesas plialtigiĝon de la poŝtarifoj kaj malpermesas malpligrandigiĝon, sed la nacioj kredinde pli altigos prezojn por eviti deficion. Certe, ne estos devigaj pligrandigoj ĝis komenco de jaro 1922. Mi supozas, ke specialaj aranĝoj inter apartaj nacioj estas ankoraŭ permesataj. Esperantistoj ankoraŭ agu kaj esperu! (Ch. G. Sp-M., London.)

## Repagu vian abonon!

Abono finiĝis (finiĝas, finiĝos) per numero:

7. Belenguer en Teruel.

10. Felsenfeld kaj Hevesti en Budapeŝt.

11. Santiago en Macelo-Alagoas. Villafranca en Buenos Aires (12 abonoj). Bochenek kaj Israel en Berlin. Tarnow en Kiel. Dederichs en Hannover. Petzold en Oschersleben. Sedlag kaj Wollmann en Breslau. Hankel en Dresden.

12. Gomez en Buenos Aires. Tael en Paida. Seim en Tallinn. Grauzeliu en Seirijai. Kubeŝova en Trebon. Podlipsky en Smichov. Hell en Eger. Sabev en St. Seblievsko. Minkov en Sofia. Jäger en Pisa. Germana Esp. Librojo en Leipzig (2 abonoj). Lippman en Zwenkau. Klein, Velg, Ross kaj Stege en Essen. Welzel en Reutlingen. Reber en Bamberg. Bachrach en Berlin. Schmidt en Gera. Höfer en Zachow. Scheel en Warnemünde. Schilling en Reichenau.

13. Grau en Barcelono. Poupeye en Sint Krutis. Jalava kaj Polusstelo en Helsinki. Lindqvist en Lahii. Smetak en Praha. Obersky, Ganz kaj Elsnar en Berlin.

14. Attila kaj Rosta en Helsinki. Birk en Tallinn. Bodichchio en Potenza. Flatters en Mainz. Lauerhaas en Nürnberg. Thomalla en Magdeburg.

15. Suuronen en Helsinki. Dabrowski en Rzeszow. Vidikauskas en Philadelphia. Klafs en Düsseldorf. Nellissen en Schluchsee. Schlitter en Dortmund. Mausfeld en Hagen (2 abonoj). Ostermann en Gera. Hofmann en Chemnitz. Faber en Stolberg (1 abono; aliaj valoras ĝis 25 por s-ro Hellmund, ĝis 24, kaj ĝis 53 por s-ro Faber).

16. Goodliffe en Purley. Colivicchi en Volterra. Puppo en Genova. Cerny en Trebechovice. Spire en Uzhorod. Habert en Paris. Glencstein en Kalisz. Usko en Skopau. Lange en Werdau. Schneider en Düsseldorf. Germ. Esp. Librojo en Leipzig (1 abono). Brehm en Regensburg. Jacobs en Flensburg. Schneider en Gera.

17. Koovisto en Laihia. Kosonen en Wiipuri. Vahtkerl kaj Fasane en Tallinn. Schutzky en Philadelphia. Rose en Hagen. Urban en Frankfurt. Lewin en Hagen. Gronau en Gelsenkirchen. Thies. Ransbach kaj Remers en Düsseldorf. Müller en Schönblick. Schmitter en Kirdorf. Hermann en Stuttgart. Lorenzen en Flensburg. Lesehalle en Altona.

18. Rivers en San Francisco. Szekacs en Vazc. Grünthal en Haapsalu (2 abonoj); trian abonon de 25. dec. je n-roj 1-32 ni halkulos de 7-38, ĉar la n-roj 1-6 estas elĉerpitaj). Germ. Esp. Librojo en Leipzig (2 abonoj). Küper kaj Schmidt en Düsseldorf. Zeidler en Nordrach. Neumärker en Kalk.

Abonpago de s-ro Falcao en Fortaleza-Ceara (Brazilio) por 10 abonoj ĝis nun ne elvenis.

## Recenzejo.

### LIBROJ.

**PRO KIO?** Internacia kriminal-romano originale verkita de Argus. (Nova Esp. Biblioteko n-ro 5.) 158 pg. 11:15 cm. Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59. Prezo: bele kartonita 6 mk. kaj 20<sup>o</sup>/<sub>100</sub> T. (multekosteca aliĝo).

Jen nova, valora original-romano. Kun granda ĝuo mi ĝin finlegis admirante la maistrecon de la verkinto. Sub la nomo Argus sin kaŝas konata samideano, kies pacan, senlakan laboradon por Esperanto ni tre ŝatas. D-ro Steche jam kompetente juĝis pri la verko.

Argus maistre scipovas nian lingvon kaj babilas kiel la plej lerta romanverkisto. Kiel li ne fariĝis detektivo? Li pruvis, ke li havas la kapablecon solvi eĉ la plej gravajn komplikojn. En la arto de l' amo li ankaŭ ne estas novulo. Li estas tre sperta en ĉiuj deliktaj aferoj kaj skizis virajn kaj virinajn karakterojn tiel bonege, ke la legantoj multon lernos el liaj observadoj. Pri la enhavo mi ne volas paroli. La ĝuiga legado sircetas la atenton de l' komenco ĝis la fino.

Laŭ lingva vidpunkto nenio estas kritikota. Bonega stilo, pura klasika lingvo, abunda je modelaj formoj kaj lingvaj beleĵoj. Eĉ ne progresinta Esperantano facile legos kaj komprenos la tekston, kaj li perfektigis per la legado, kiu ne nur instruas lingvarilate, sed donas ankaŭ saĝajn konsilojn por ĉiu, kies profesio postulas boninformitecon pri homaj karakteroj, bonaj kaj malbonaj.

La aŭtoro tre ofte uzas la vorton: fiukazo. Li pravas uzante tiun formon, ĉar „fiukazo“ havas tute alian sencan kaj ne estas trafa. Ni lasu al la vorto „kazo“ la duan sencan, kiun jam multaj aliaj fundamentaj vortoj ricevis. Neniu kompetentulo en lingvaj demandoj neos, ke ekzistas granda diferenco inter okazo kaj kazo. Oni tre malofte parolas en la ĉiutaga vivo pri gramatika kazo, sed tre ofte pri kaŭza aŭ kondiĉa kazo (ne okazo!). Novan esprimon ni ne bezonas.

Preserarajn la libro ne enhavas. Papero kaj preso estas bonegaj.

Mi varme rekomendas la verketon, kiu estas valora pliriĉigo de nia Esp. literaturo, al ĉiuj gesamideanoj. (G. Ajul.)

**JARLIBRO** por 1921 de la Foiro de Reichenberg (Bohemio). Formato 22<sup>1</sup>/<sub>2</sub>: 30 cm. Germanlingve. Kun kalendario, adresoj de la membroj de unuigo „Reichenberger Messe“, statistiko, tabeloj, artikoloj ktp. Interalie artikolo pri nia lingvo „La venkito de Esperanto“. Multaj anoncoj.

**DIE WELTHILFSSPRACHE ESPERANTO IN ZWEI WOCHEN.** Germanlingva konversacia gramatiko de A. Pankrat. Havas 62 „Nove Tory“. Bromberg (Polio). Prezo 5 germ. mk. (en rekomendita letero). 12<sup>1</sup>/<sub>2</sub>: 20 cm. 40 pg.

### GAZETOJ.

**KATALUNA ESPERANTISTO.** Jan. Oficiala organo de Kataluna Esp. Federacio, Carme 50, Barcelona. Aperas ĉiunovo 22: 16 cm, 12 pg. kaj 4 pg. kovrilo. — Se la reapero de K. E. signifas novan grandan movadon en Katalunio, ĝi tre ĝoigos nin. Sed ni jam aŭdis, ke de post 1921 aperos „La Semisto“, ĝis nun Monata Bulneto de Aplech Esp. Grupo en Sabadell. Kaj ni tre dubas, ĉu du gazetoj havos sufiĉan subtenon en tiu ĉi provinco por daŭre ekzisti.

**LA ESPERANTISTO.** Nov.-dec. La gazeto iom pliampleksigis laŭ formato kaj enhavo. Samzure la abonprezo estas plialtigita kaj atingas proksimume la prezon de ET. 6 numeroj (jarabono) de tiu ĉi gazeto kostas 1 sv. fk., 6 germ. mk., 20 hung. kr. ktp. La gazeto estas bonegale redaktita kaj bone presita kaj havas eldonnumbron de 5500 ekzempleroj.

### Aliaj gazetoj ricevitaj:

Amerika Esperantisto. Nov., dec.  
Bulgara Esperantisto. Jan.  
Esperantsky Zpravodaj N-ro 5.  
Franca Esperantisto. Jan.  
La Espero. Nov.-dec.  
La Revuo Orienta. Nov.  
La Verda Ombro. Nov.  
Le Monde Esperantiste. Nov.-dec.  
Literaturo. Okt.-dec.  
Nova Tempo. Dec.

## El „La Bretagne qui chante“

de Louis Tiercellin.

Neniam vivigos la rozo mortinta, —  
Ĝin premas piedo de la vaganto,  
Ĝin pelas la spiro de vento blovanta,  
Pereas la rozo, la teron tuŝinta.

Kaj ofte sub miaj okuloj plorintaj  
Disfalas de l' revoj diecaj la floro,  
Mi la iluziojn forpelis el koro,  
Sed mi ne revenas al revoj mortintaj.

El franca lingvo tradukita  
ALEXANDRA MEXIN.

### ENIGMOJ.

Manuskriptojn de enigmaĵoj oni bonvolu sendi al  
S-ro Max Butin, Kronprinzstr. 33, Bad Godesberg, Germ.  
**SOLVOJ** el n-ro 11.

12.

Zamenhof  
Abrikoto  
Merkedo  
Elefanto  
Nikolino  
Hiacinto  
Omnibuso  
Fringelo.

13. Lutro. — Trulo.

14.

a) Argilo. — Angilo; b) Rabeno. — Rubeno.

### NOVAJ ENIGMOJ.

15.

### SILAB-ENIGMO.

a, bul, ci, ci, den, do, do, fe, fo, ge, go, go, is, jo, ka, lan, li, lo, ni, ni, no, no, o, ok, pe, ra, ra, re, ri, sol, to, ve.  
Oni kunmetu la silabojn tiamaniere, ke rezultos: 1. floro, 2. birdo, 3. hispana provinco, 4. trinkaĵo, 5. ĉieldirekto, 6. veturilo, 7. fama batalejo, 8. titolo de mahometana princo, 9. insulo.

La komencaj literoj de ĉiuj vorto legataj de supre al malsupre nomas konatan pol. poeton.

16. ANAGRAMO.

La literoj de birdo legitaj en alia vico nomas diablan fantomon. (M. Butin.)

### SERCA DEMANDO.

Kiu urbo estas mangĉelo? (L. Funken.)

[SOLVOJ publikigotaj en posta numero.]



# 4<sup>a</sup> Internacia Foiro de Frankfurt a. M.



Printempa foiro: 10.—16. aprilo 1921.

Ampleksa ekspozicio de 30 branĉoj.

Programo:

Importo kaj Eksporto.

Akcelado kaj rekonstruado de la internacia interŝanĝo de komercaĵoj.


Prospektoj en germana, angla, franca, itala, hispana, dana, norvega, holanda, sveda lingvoj kaj en Esperanto.

Korespondado en Esperanto!

Antaŭ-Katalogo kun plurlingva registro, Listo de la Komercaj Branĉoj en Esperanto.

Oni petu tuj presajojn aŭ detalajn informojn de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. M. (Germ.).



Pola eldonisto havas la eblon tuj liveri  
**1000 ekzemplerojn de la fame konata verko**

## „Parnaso de Popoloj“

majstre tradukita de Antoni Grabowski.

La libro enhavas krom originalaj poemoj ankaŭ tradukojn el 30 diversaj lingvoj.

Grandforma libro 230-paĝa.

Prezo malkara.

La ofertojn oni bonvolu direkti laŭ adreso:

**Adolfo Oberrotman, del. UEA en Varsovio,  
Krak-Przedm. 10 (Polio).**



## Filatelistoj!

Ĉiuspecajn hungarajn poŝtmarkojn vendas,  
ankaŭ grandkvante kaj po folio. Proponojn  
kun prezo al

**Akos Borsodi, Budapest VI,  
Révay utca 24. — (Hung.)**

## Ĉiuj produktoj por ĉiuj landoj

# H. Bidaux

Esperantista Fermo.

Speciala Fako en:

**NUTRAJ PRODUKTAĴOJ — LIKOROJ  
— VAKSKANDELOJ —  
ŜNUROJ — ŜNURETOJ — PARFUMARO  
— FABRIKITAJ PRODUKTAĴOJ. —**

**S-ro H. Bidaux, Paris 12-e  
5 - Place d'Alligre.**

## Judaj Esperantistoj!

Dum la Dektria en Prago okazos fakkunveno de naĉaj judoj, celante la fondon de „TEJA“.

Interesuloj, precipe partoprenontoj la Dektrian, interrilatu pri tiu ĉi afero kun la aranĝanto, s-ano Wilh. Heller, Leitmeritz (Bohemio) aŭ kun s-ano S. Lewin, Hagen i. W. (Germ.)

## Ofico.

30-jara pola samideano, 15-jara praktiko komerca kaj oficeja, 4 lingvoj, sperta komercisto, unuagrada atestoj kaj rekomendoj, serĉas oficon kun certa estonteco en iu ajn lando. Havigos rekompencan al kiu helpos en tiu serĉo.

Ofertojn oni dume povas direkti laŭ adreso de **Adolfo Oberrotman, del. UEA, Varsovio (Pol.)** Krak-Przedm. 10.

Aleksandro Laquer (Sandor), industria artisto (ostoskulptisto), eksnotario, internacia komisiisto, ĉefsekretario de Hung. Esp. Soc., Budapest, Kiraly str. 57-II-2, akceptas

## Reprezentadon

en Hungarujo de ĉiuj ajn ŝtatoj, fabrikistoj, grandkomercistoj; komisiitojn privatajn, oficialajn, komercajn; nature nur korespondante Esperant-lingve. Sendas ne uzitajn hung. poŝtmarkojn (tutaj serioj) por katalog-prezo aŭ por aliaj valorajoj. Nun bezonas eburon (elefant-osto).

## HINAJ SILKŜTOFOJ

Mi sendas per poŝtpakaĵoj ĉiuspecajn hinajn silk-ŝtofojn kontraŭ respond-kuponoj. Tre bone por vestaĵoj de eŭropaj infanoj kaj virinoj.

Sendu unu respond-kuponon por belaj specimenoj ktp.

Esperanto korespondata.

**C. S. Gee, Hai-Yen (via Shanghai),  
Hinujo.**

### Anoncetoj.

**AĈETO.** Mi deziras aĉeti: 1. ET n-rojn 1 kaj 2; 2. la vortaron de Jürgensen kaj Pagnier (esp.-germane kaj germ.-esp.) ambaŭ redaktitaj de Zamenhof; 3. Engel, Deutsche Stilkunst, kaj Poehlmann, Geisteschule. — Anton Jüngling, Waldsassen (Bavario), Egererstrasse 49.

**ŜANĜO DE ADRESO.** S-ro Ksaw. Allus (Krakow, Pedzichow 22) sciigas ĉiujn interesulojn pri ŝanĝo de sia adreso; ĝi estas: Ksaw. Allus, Wied-Bank Związk., Tarnow (Polujo). La ŝanĝo koncernas ankaŭ korespondadon kun „E.E.A.S.“

**ĜARDEN-KULTURO.** Mi deziras korespondi pri ĝardenistaj lernejoj, kaj ĝarden-kulturo. Bonvolu sendi al mi literat. ajn prospektojn kaj ĉiujn Esperantajn: broŝuroj, afiŝoj, bildkartoj, gazetoj, libroj ktp. Josef Halasz, del. UEA, Targu-Mureș, Kőteles S. u. 16, Rumanio.

**ETIKIŜMO.** Mi tre volonte konatiĝus kun la celado de liberreligiaj, etikaj kaj aliaj ekster-ekleziaj movadoj en la mondo (ekzemple: monismo kaj liberala komunismo en Germanio, labour-church kaj ethical societies en Britio ktp.). Presajojn en angla, franca kaj germana lingvoj mi scias kompreni. Cetero mi ŝatas korespondi pri tiu temo. J. L. Bruin, Daguerrestraat 153, Hago (Nederlando).

**TRIKOTAĴOJ ĈIUSPECAJ.** Mi volas ricevi ofertojn de eksterlandaj fabrikantoj speciale de fantaziaj artikoloj. J. D. Applebaum, 11 Mayville Rd., Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

### DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

Walter Lippmann, Zwenkau (Saksio), Ritterstr. 11, deziras interŝanĝi done aŭ vende: ĉiujn librojn, ankaŭ Esperantajn, poŝtm., ilustr. poŝtkartojn novajn kaj uzitajn, gazetojn germ. kaj Esp.; riceve: poŝtmarkojn (prefere malnovajn), Esp. gazetojn.

S-ro Michaelo Zsamboky, Kispeszt, Beresenyi u. 55, Hung., korespondas kun socialistoj el ĉiuj landoj.

S-ro A. Kurassov, Tallinn, Estonio, Riisenkampfi 1. 29-3, deziras korespondi pri diversaj temoj, per poŝtkartoj kaj leroj, kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Kiu sendas al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos ankaŭ 50 poŝtmarkojn de Germanio. Mi tuj respondas. Walter Dick, Plauen i. V. (Germ.), Forststrasse 84.

S-ro Jorma E. Partanen, kiu antaŭe loĝis en Lusiaukaunpi, estas transloĝinta al Tampere, kaj deziras korespondi per il. poŝtkartoj kaj leroj kun ĉiuj landoj. Mi tuj respondas. Kiu sendas al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos ankaŭ 50 poŝtmarkojn de Germanio. Mi tuj respondas. Walter Dick, Plauen i. V. (Germ.), Forststrasse 84.

S-ro Jorma E. Partanen, kiu antaŭe loĝis en Lusiaukaunpi, estas transloĝinta al Tampere, kaj deziras korespondi per il. poŝtkartoj kaj leroj kun ĉiuj landoj. Mi tuj respondas. Kiu sendas al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos ankaŭ 50 poŝtmarkojn de Germanio. Mi tuj respondas. Walter Dick, Plauen i. V. (Germ.), Forststrasse 84.

S-ano Francisko Prengel, Bydgoszcz (Polio), Podgorze 17, interŝanĝas Esp. gazetojn, poŝtmarkojn, gvidlibrojn. Samideanoj el ĉiuj landoj sendu priskribon de via literaturo, muziko ktp. (rakontojn, noveltojn). Mi tradukos ilin por la ĉi tiea pola kaj germana gazetaro. Servu tiamaniere al via lando kaj nia kara lingvo!

Dezirantoj korespondadi, interŝanĝi pri Siberio, pri Rusio, pri regado de Kolĉak kaj aliaj generaloj, povas komenci interkorespondadon kun s-ro B. Najdin, Kuzneckaja 63, Omsk, Siberio.